

Heinrich Heine,  
The Lorelei

*tradukita de L. W. Garnham*

I do not know what it signifies.  
That I am so sorrowful?  
A fable of old Times so terrifies,  
Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,  
And calmly flows the Rhine;  
The summit of the mountain hearkens  
In evening sunshine line.

The most beautiful Maiden entrances  
Above wonderfully there,  
Her beautiful golden attire glances,  
She combs her golden hair.

With golden comb so lustrous,  
And thereby a song sings,  
It has a tone so wondrous,  
That powerful melody rings.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro  
naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim Gießner*

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

The shipper in the little ship It effects with woe sad might; He does not see the rocky slip, He only regards dreaded height.	Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremo- ci'. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.
--	---	---	---

I believe the turbulent waves Swallow the last shipper and boat; She with her singing craves All to visit her magic moat.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kantado.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad'.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.
--	--	---	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

*L. W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhovo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)